# HEROLDO DE UTENA

**Informilo de BET- 49, 13-07-2013, sabato** N-ro **8**


**Aleksander Korĵenkov** **MI EN LITOVIO**

– Geknaboj, – ekskursgvidantino diris al ni, – ne forgesu, ke nun ni estas en eksterlando, kondutu bone kaj estu singardaj.

– Sed ne! Ni ja estas en Sovetunio, – oponis ĉioscia Sergio.

– Jes kaj ne, – ŝi respondis kaj faris al ni neplanitan lecioneton pri historio.

Ĉi tiel mi, 16-jara lernejano, unuafoje aperis en Litovio, mia unua eksterlando…

Tio okazis antaŭ 39 jaroj, en julio 1974. Mi revenis al Litovio plurfoje, jam kiel esperantisto, kaj, kiam privata eldonado ne estis ebla en la Sovetia Ruslando, ĉiuj 26 numeroj de la legenda (kaj leg-enda) almanako *Sezonoj*, redaktita de mi en la 1980aj jaroj en Uralo, estis presitaj en la Sovetia Litovio.

Sovetio malaperis antaŭ pli ol 20 jaroj. Sed la solidaro daŭras. *La Ondo de Esperanto* nun estas presata en Litovio, same kiel niaj libroj, kaj dissendata de ĉi tie al kvindeko da landoj.

Mi volonte uzas la okazon kaj dankas al Litovio kaj al Litoviaj esperantistoj. Miaflanke, mi volonte helpas ĉe organizado kaj funkciado de esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj en Litovio. Kaj mi ŝatas veni al Litovio por ripozi kaj bierumi kun miaj Litoviaj geamikoj (ne nur esperantistaj).

Se temas pri BET-49, ĝi estas tre altnivela. Variaj kursoj, interesaj prelegoj, belaj koncertoj, bonaj ekskursoj, renkontiĝoj kun amikoj, oportuna komputilejo… Mi povus daŭrigi la meritaj laŭdojn, sed la redaktoro de HdU diris al mi, ke jam estas multaj laŭdoj pri BET-49 kaj ke mi verku kritikan artikolon. Nu, – laŭ Zamenhof, – kritiki estas facile.

Litoviaj BETоj fariĝas ne forumoj de baltaj esperantistoj, sed internaciaj Esperanto-kongresoj en Litovio. Tio ne estas malbona, sed laŭ la origina intenco BET estas komuna aranĝo de la tri baltaj landoj, kaj estus tre bone, se, ekzemple, apud la bonegaj litovaj folkloraj koncertoj oni povus konatiĝi ankaŭ kun popolarto latva kaj estona; se en BET oni planus kaj resumus komunajn kulturajn kaj edukajn projektojn de la tri Esperanto-Asocioj; se oni rakontus pli detale pri la problemoj kaj atingoj de niaj samideanoj en ĉi tiuj tri landoj; se…

… sed mi ja estas en eksterlando, do mi kondutas bone kaj estas singarda.

Dankon al la organizantoj pro la bonegaj Tagoj!

**LA PROGRAMO por la 14-a de julio (dimanĉo)**

| | |
|---|---|
| **8.00 – 9.00** | Matenmanĝo |
| **9.00 – 18.00** | **Disveturo** |

## RAPORTAĴO ANTAŬ ADIAŬO

Jam morgaŭ BET-49 finiĝos, okazos la solena Fermo. Hodiaŭ la gvidanto de kelkaj radio-elsendoj en populara radiostacio "Laisvoji banga" (Libera ondo) esperantisto Audrys Antanaitis venis al BET kun sia aparataro por fari senperan elsendon por tuta Litovio. Pri BET kaj Esperanto, kompreneble!





La unua estis paroligita Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto Asocio, ĉeforganizanto de BET-49. Sekvis demandoj al malnova BET-ano Arimantas Račkauskas kaj Abdurahman Junusov (ankaŭ pri situacio en Dagestano) kaj iliaj respondoj.

## IMPONA VOJAĜO

Merkredo estis la ekskursa tago. Multaj el ni, "betanoj", ekskursis. Piede tra la urbo Utena aŭ aŭtobuse, kiel ni, tra nordorienta Litovio. La ekskuso daŭris longe. Ĝi estis interesega pro la naturo kaj enhavoriĉa pro konatiĝo kun historiaj vidindaĵoj. Ni vizitis la urbeton *Leliūnai*, kie ekde 2001 troviĝas interesa muzeo pri ceramiko, organizita de la fama litova „reĝo de potistoj" Vytautas Valiušis. En la urbo *Rokiškis* ni vizitis muzeon en iama palaco de Tyzenhaus-familio. Interesega estis ekspozicio de lignaj skulptaĵoj ĉizitaj de Longinas Šepka, ankaŭ rakonto pri la vivo de tiu majstro. Imponis ankaŭ la ĉefa placo de Rokiškis kaj ĝia preĝejo.

Atentinda estis la vilaĝo *Kvintiškiai* ĉe la lago *Ilgis*, kie en la jaro 1967 por du biciklantoj sur la lago aperis Dipatrino. Apude nun staras multaj diversaj krucoj. Imponis la 1500 jarojn aĝa, plej maljuna, ne nur en Litovio, kverko *Stelmužė*. La apuda ligna preĝejo pruvis al la ekskursanoj, ke eblas konstrui ankaŭ sen feraj najloj.

En iama akvomuelejo *Šlyninka* (nun elektra) lia posedanto rakontis pri fabrikado de faruno kaj grioj el diversaj grenoj. Al ĉiuj bongustis flanoj bakitaj laŭ malnova recepto. Fine ni navigis tra lago Alaušas kaj post aventura surinsuligo tie manĝis fiŝan supon.

La tago estis plena de impresoj. Fine, malgraŭ longa vojo ni reveninte sukcesis aŭdi grandparton de la prezentado, kiun donis Emanuele Rovere.

*NINA*

Al la rakonto de malnova pola esperantistino Nina Pietuchowska kelkajn pensojn aldonis tute nova litova esperantistino **Angelina Lapinskaitė**:

"Impresis la palaco de bieno en Rokiškis. Tie ĉiu objekto havis sian sekreton kaj historion. Veninte al la lago *Alaušas*, ni naĝis per katamarano kaj motorboato kaj, kompreneble, raviĝis pri la lago. El la ekskurso ni revenis lacaj, sed feliĉaj. Ni estas dankaj al tiuj kiuj kreis ĉi feliĉon, al la organizanto Antanas kaj Gražina, nia interpretistino".











*Nia intervjuo*



**Stano Marček** Prezidanto de Slovaka Esperanto-Asocio, redaktoro de la revuo "Esperanto"

**Kio instigis vin veni al BET?**

La ĉeforganizanto de BET-49 Povilas Jegorovas invitis min instrui ĉi tie kaj prelegi. Mi konsentis. Mi instruas komencantojn laŭ mia rekta metodo. Krom tio mi preparis prelegojn pri mia metodo, pri miaj lernolibroj kaj didakta materialo. Pri krucenigmoj kaj manĝeblaj fungoj.

**Vi havas okazojn partopreni en multaj Esperanto-renkontiĝoj internaciaj, en Universalaj Esperanto Kongresoj. Pri kio vi okupiĝas tie?**

Fakte mi faras nun turneon. Mi instruis en Hungario, en fama Junulara tendaro. De tie mi iris rekte ĉi tien, kie mi jam instruis kaj prelegis. Bedaŭrinde du tagojn antaŭ la fino, hodiaŭ do, mi devas forveturi al mia urbo Martin en Slovakio, kie morgaŭ komenciĝos Somera Esperanto-Studado, al kiu aliĝis jam pli 200 dezirantoj el 25 landoj. De tie mi flugos al Islando por la Universala Kongreso. En ĉiuj Esperanto aranĝoj okazas io interesa por mi. Sed al Islando mi flugas precipe kiel ĵurnalisto, ĉar aŭtune mi devas en la septembra revuo "Esperanto" raporti pri Universala Kongreso de Esperanto.

**Kiel mi scias, en via lando okazas multaj esperantistaj aranĝoj. Esperanto do tie fartas bone kaj eble eĉ progresas.**

Ŝajnas al mi – jes! Ĉar en Slovakio okazas Someraj Esperanto-lernejoj aŭ Studadoj jam la sesan jaron! Krome, okazas sciencaj simpozioj. Krome, mi havas novaĵon. Antaŭ kelkaj semajnoj okazis Kongreso de Slovaka Esperanto-Federacio (kies Prezidanto mi estas). Mi konstatas, ke en diversaj asocioj, ĉu naciaj, internaciaj aŭ universalaj aperas la fenomeno, ke junularo iras sian apartan vojon.
La maljunuloj iras sian vojon, la kristanoj – sian. Feliĉe al ni, en nia kongreso mi sukcesis grupigi ĉiujn sub unu tegmento. La jure sendependa Junulara Asocio aliĝis al ni kiel kolektiva membro. Tiel fine, mi sukcesis konstrui komunan tegmenton super ĉiuj slovakaj Esperanto organizoj. Prezidanto de la Junulara organizo fariĝis vicprezidanto de la Landa Asocio.

**Vi multe skribos pri la Universala Kongreso en via revuo. Ĉu sur ĝiaj paĝoj troviĝos loko por temo pri BET?**

Certe, mi raportos pri ĝi. Raportos pri ĝi ne nur la revuo "Esperanto", ankaŭ "Esperantisto slovaka", kiun mi kunredaktas. Ja ĝi denove fariĝis oficiala organo de nia landa asocio.

## Niaj impresoj

Proksimiĝas la lastaj belaj momentoj de la 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj! Ni pasigis neforgeseblan semajnon en pitoreska kaj bone ordigita litova urbo Utena, kie ni estis sincere kaj afable akceptitaj. Ni sentis favoron kaj amikan rilaton de utenanoj al esperantistoj.

Dum la BET-49 ni multon eksciis pri historio de litova lingvo, lando kaj ĝia kulturo. Por ĉiuj dezirantoj estis ebleco lerni kaj plibonigi sian lingvoscion ĉe brilaj instruistoj de lingvo Esperanto.

Abunda kaj interesa programo de Somera Universitato allogis pli ol ebleco ĝui someran freŝan aeron kaj akvon de la lago *Dauniŝkis*. Tamen vespere la lago per siaj multkoloraj lummuzikaj fontanoj estis ekster ajna konkurenco.

Dum la varmegaj kaj sunaj tagoj bonege freŝigis multajn de ni altkvalita kaj bongusta biero de Utena. En la ekskurso al "Utenos Alus" ni eksciis la sekretojn de bierfarado kaj povis gustumi 5 specojn da biero.

Bone planita kaj organizita tuttaga ekskurso donis eblecon ekkoni belajn lokojn de Litovio, ekscii multajn interesajn faktojn pri nia najbara lando kaj samtempe bone ripozi. Estas evidente, ke Dio favoras al Esperanto, ĉar donacis al ni bonegan veteron dum la tuta BET-semajno.

Ni esperas, ke sekvontjare ni ankaŭ sukcesos organizi enhavriĉan kaj interesan la BET-50 (28.06.-04.07.2014), kaj invitas vin ĉiujn al Jelgava (Latvio).

Biruta kaj Margarita el Latvio

## INTERRETO KAJ NI

Lastatempe aperas multaj diskutoj pri tio, ke realaj homaj interrilatoj translokiĝas al la interreto, ĉefe al la sociaj retoj, ke la virtuala mondo pli kaj pli "anstataŭigas" la realan. Estis organizitaj kelkaj eksperimenrimentoj, kiam la homo, kiu ĉiutage uzas interreton, rifuzis uzi ĝin por semajno, monato, jaro... Ekzistas eĉ prognozoj, ke baldaŭ preskaŭ la tuta komunikado estos virtuala kaj ke nur malmultaj homoj renkontiĝos ekster la reto.

La alia afero estas la kontaktoj de esperantistoj, kiuj estas disĵetitaj tra la tuta mondo. Relative ne ofte ili povas renkonti unu la alian, sed interreto helpas ne perdi la kontaktojn kaj amiki. Ekzistas eĉ teorio laŭ kiu Esperanto plu vivos dank' al tiaj interretaj kontaktoj. Dum BET-49 okazas multaj prelegoj kaj diskutoj pri sociaj retoj kaj ilia signifo por esperantistoj. Jam okazis prelego de Dima Ŝevĉenko pri la teorio kaj nuna stato de sociaj retoj.

## DANKON AL ORGANIZANTOJ!

Sian dankon esprimas esperantistinoj el litova urbo Panevėžys.

**Laima Ragauskaitė**: Dankon pro la novaj spertoj, memorigaj tagoj kaj la ebleco ekkoni homojn el diversaj landoj. Ni ne haltu, ni perfektiĝu!
**Alina Plerpienė**: Dankon pro la bona akcepto, riĉa programo kaj eĉ la ebleco distriĝi en diskoteko!
**Donata Manionenė**: Mi estas kontenta pri la organizado de BET, pri elekto de BET-loko kaj okupateco. Mi perfektigis miajn lingvokonojn, akiris novajn geami-kojn. Min incitis troa laŭteco dum la koncerto de "Solotronik" kaj mi forlasis la koncerton.

## KOBOLDO !

En la artikolon "Latvia najtingalo" (Heroldo de Utena" n-ro 7, pĝ. 4) enŝteliĝis malagrabla eraro: Latvia najtingalo estas ne Lidija Jevsejeva, sed **Ludmila Jevsejeva**!

## Vizito ĉe vikingoj



Semajnfine de 14.–15.9.2013 Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) invitas vin al la ***Aŭtunaj Tagoj 2013*** kun la temo "Insulara naturo kaj vivo – Saaristoelämää" en la banejo de *Kasnäs*, sur la bela insulo *Kimitoön* (finne: Kemiönsaari). Eblas veni jam vendrede 13.9. por pli ĝui la unikan insularan pejzaĝon. Sabate ni ekskursos per ŝipeto al la Vikinga Centro *Rosala*.

Por detalaj informoj iru al "Aŭtunaj Tagoj 2013" en la retpaĝo www.esperanto.fi/Eventoj/

Dankon, Robert Bogenschneider

INREVJUITOJ DE LA RADIO „LIBERA ONDO"



*Abdurahman Junusov*



*Arimantas Račkauskas*

Diversajn pormemorajn BETaĵojn ricevis la partoprenantoj en la sakoj kun la invito: „**Vizitu nian domon. Litova Esperanto-Asocio,** L.Zamenhofo g. 5". Estas la domo kie loĝis mecenato de Esperanto A.Zilbernik kaj kiun kelkfoje vizitis L.L. Zamenhof.



*Surfote: la historia Esperanto-domo en Kaŭno*

Redaktoro
Vytautas Šilas,
+370 611 75500
vilnastelo@yahoo.lt